# La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

☛ **Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto" (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Samenhof à Varsovie, Russie).**

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de **Heerdegen-Barbeck** en **Nurnbergo.**

**No. 10.** **Nurnbergo,** Oktobro 1891. **Jaro II.**


## Literaturaj konkursoj.*)

Estas tute kompreneble, ke la plej grava zorgo por la aldonitaj esperantanoj estas la demando, kiel oni povas plej rapide kaj plej sukcese disvastigi sian amatan aferon. Bedaŭrinde, en la mondo rapide progresas nur aferoj, kiuj poste tiel same rapide pereas. Ankaŭ ni devas antaŭ ĉio memori, ke la homaro ne prenos al si nian aferon ĝis ĝi ne estos konvinkita, ke tiu ĉi afero efektive estas utila fakto — ne projekto, sed preta fakto. Tial, se ni penados nur konvinki la homaron, ke la lingvo internacia, se ĝi estos akceptita, fariĝos tre utila afero, ni ĉiam renkontados malsukcesojn, ĉar la indiferenteco de la homoj estas venkebla nur per sendubaj faktoj; sed se mallaŭte kaj trankvile la lingvo internacia estos disvolvata, perfektigata, se ĝia literaturo estos ĉiam plimultigata, kaj post kelkaj jaroj la mirigita homaro ekvidos nevenkeblan fakton, tiam ĝi jam povos nek neigi, nek malestigi la lingvon internacian; tiam la amikoj de tiu ĉi triumfos la veran venkon.

Mi scias: oni diros, ke mi estas prava teorie, sed ke la programo, kiun mi proponas, estas ne plenumebla ĉe niaj nunaj fortoj kaj monaj rimedoj. „Akiru antaŭ ĉio faktistojn kaj poste jam zorgu pri faktoj!" — tielan respondon mi jam scias, sed mi ĝin tute ne konsentas. Nia afero havas jam amikojn; eble ili estas nur malmultaj, sed el ili elektiĝos kelkaj, kiuj povas fariĝi kaj sendube fariĝos faktistoj. Certe, en la komenco la progresado povas esti nur tre malrapida kaj tre malgranda, sed ne forgesu, ke ĉiu nova fakto alportados novajn amikojn, novajn fortojn, novajn rimedojn....

Pri unu rimedo por pli rapide maturigi la fakton de la estado de la lingvo internacia kaj por sciigi la publikon pri tiu ĉi maturiĝado, mi nun volas diri kelkajn vortojn. En la N 5 de „La Esperantisto" la estimata redaktoro jam turnis la atenton de la legantoj sur tiun ĉi manieron, proponante, ke oni skribadu originalajn verkojn kaj tradukadu ilin en naciajn lingvojn. Mi proponas nun, pro la sistema vigligado de tiu ĉi afero, organizi regulajn konkursojn laŭ kondiĉoj, signitaj en la malsupre sekvanta projekto:

### La regularo de la literaturaj konkursoj.

1. La konkursoj havas la celon vigligadi la originalan verkadon de rakontoj kaj rakontetoj.

Rimarko. La konkursoj estas signataj per la roma ciferoj. Ekzemple: la I literatura konkurso, la III konkursa komitato k. c.

2. Por la konkurso estas akceptataj rakontoj kaj rakontetoj, skribitaj en la lingvo „Esperanto" kaj havantaj la grandecon de 2—6 folioj de skribpapero.

Rimarko. Krom rakontetoj, povas esti allasataj por la konkursoj ankaŭ verketoj de enhavo nebeletristika, se la konkursa komitato konsentos, en ĉiu okazo, ke la prezentata verketo havas ne sole ian literaturan aŭ sciencan indon, sed havas ankaŭ intereson por esti tradukota en naciajn lingvojn por diversaj gazetoj.

3. La verketoj, difinitaj por la konkurso, estas akceptataj ĝis la 1. Oktobro de ĉiu jaro, kaj la rezultatoj de la konkurso estas publikigataj en la Januara numero de „La Esperantisto".

4. Kvin la plej bonaj verketoj, laŭ literatura aŭ scienca indo kaj laŭ reguleco kaj beleco de la stilo, estas rekompencataj per medaloj — unu per ora, unu per arĝenta kaj tri per nikelaj —*) kaj per diplomoj, en kiuj estas signataj la nomo de la rekompencito, la titolo de la rekompencita verketo kaj la aljuĝita rekompenco. La diplomoj estas subskribataj de ĉiuj membroj de la konkursa komitato.

Rimarko. La rajto de la aŭtoroj enkondukadi certajn deklinojn de la ordinare akceptita gramatiko kaj stilo ne devas esti rompata de la konkursa komitato, se la enkondukitaj novaĵoj ne transiras la limojn, notitajn ĝis nun de la aŭtoro de la lingvo.

5. La medaloj havas formon kaj grandecon oportunajn por esti portataj kiel breloko; la figuraĵoj kaj la surskriboj de la medaloj estos akceptitaj de la unua konkursa komitato kaj anoncitaj en „La Esperantisto" por la publika scio.

6. La konkursa komitato estas formata de unu prezidanto kaj du (aŭ tri?) membroj. La prezidanto ĉiam estas la aŭtoro de la lingvo „Esperanto"; la membroj estas elektataj de la legantoj de „la Esperantisto" el kandidatoj, kiujn, en nombro de 5—12, proponas en la gazeto la prezidanto de la komitato.**)

7. La elektado de la membroj de la komitato estas farata ĉiujare post la publiko de la rezultatoj de la antaŭjara konkurso. La nomaro de la kandidatoj estas presata en tiu sama numero de la gazeto, en kiu estas anoncataj la rezultatoj de la jus estinta konkurso. Por la alsendo de la voĉoj estas

*) Tiun ĉi artikolon ni ricevis antaŭ la presado de niaj artikoloj en la NNr. 8 kaj 9. Nun laŭ nia opinio oni devas antaŭ ĉio decidi la demandon pri la akcia societo, aŭ almenaŭ certigi la ekzistadon de nia gazeto, — ĉio alia venos poste. Tamen ni volonte prezentas al la atento de niaj amikoj la proponon de sinjoro Lojko. La redakcio.

*) Aŭ de ia alia nemultekosta metalo.

**) Tiu ĉi rajto necese devas esti lasita al la aŭtoro de la lingvo, ĉar nur li scias bone la personojn, kiuj povas esti la plej bonaj juĝistoj de la literatura kaj stila indo de esperantistaj verkoj. J. Lojko.

difinata la tempo de kvar monatoj, kaj en la Julia numero de „La Esperantisto“ estas publikigataj la nomoj de la nove elektitaj membroj de la komitato.

Rimarko. Por la du unuaj konkursoj la supresignitaj limtempoj devas esti iom aliigitaj, por ke la I konkurso povu estiĝi ne pli malfrue ol ĝis la 1a Aprilo (anstataŭ 1a Januaro) de 1892 kaj la II konkurso finiĝu ĝis la 1. Januaro de 1893.

8. La estintaj membroj de la komitato povas esti denove elektataj.

9. La verketoj de la membroj de la komitato ne estas akceptataj por la konkurso.

10. La membroj de la komitato ricevas ankaŭ, kiel rekompenco, nikelajn medalojn kun diplomoj, kiujn donas al ili la sekvanta komitato; en tiu ĉi diplomo estas signata la nomo de la estinta membro, la No. de la konkurso, en kiu li estis juĝanto, kaj la nomaro de la verketoj rekompencitaj en tiu konkurso.

11. La personoj, kiuj estis juĝantoj en du konkursoj, kiuj sen interrompo sekvis unu post la alia, estas rekompencataj per la arĝenta medalo, kaj por tri seninterrompaj konkursoj oni ricevas la oran medalon.

12. La manuskriptoj, difinitaj por la konkurso, estas sendataj al la prezidanto de la komitato aŭ al alia membro de ĝi, se la komitato elektos iun el siaj membroj por la ofico de la sekretario. Tiuj ĉi manuskriptoj ne havas noman subskribon, sed nur iun epigrafon, kiu devas esti surskribita ankaŭ sur la aparta kovrita koverto, en kiu devas esti la nomo de la aŭtoro de la alsendita verketo. La kovertoj estas malkovrataj nur tiam, kiam la juĝoj jam estas faritaj de ĉiuj membroj de la komitato, kaj la rezultatoj de la konkurso jam estas sciataj al ili. La manuskriptoj kun nomaj subskriboj aŭ kun malkovritaj kovertoj, kiuj enhavas la nomon de la aŭtoro, ne estas alprenataj por la konkurso.

13. La verketoj, rekompencitaj per la ora kaj arĝenta medaloj, estas deve presataj en la daŭro de la sekvanta jaro en la gazeto aŭ en formo de apartaj libretoj, laŭ la bontrovo de la prezidanto de la konkursa komitato; la ceteraj rekompencitaj verketoj ankaŭ estas presataj laŭ ebleco.

14. Ĉiuj elspezoj, necesaj por la konkursoj, estas kovrataj el aparta konkursa fondo, kiu formiĝas per liberaj oferoj de la amikoj de la lingvo.

---

Donante tiun ĉi projekton, mi petas la legantojn:

1. Sciigi min (I. Lojko en Vilno, Rusujo) en la daŭro de du monatoj, ĉu Vi konsentas la proponatan projekton, kaj kiajn aliigojn aŭ plibonigojn Vi volus enkonduki en la reguleron;

2. sendi projekton de la medalo;

3. se Vi volas oferi ion por formado de konkursa fondo, difini la sumon, kiun Vi povas doni.

Por la komenco mi enskribas min mem en la kolekton de la oferoj kun la sumo de dek rubloj. J. Lojko.

P. S. Estus eble bone fari en mia projekto la sekvantan malgrandan ŝanĝon: anstataŭ unu rekompenco de la dua grado (arĝentaj medaloj), mi difinus du aŭ tri, kaj anstataŭ tri premioj de la tria grado, mi enkondukus nelimigitan nombron, laŭ la nombro de la konkursaj verkoj kaj bontrovo de la konkursa komitato. J. L.

## Kiu estas la plej bona amiko de l' viro?

Sudrusa popol-rakonto, tradukita de K. Hübert.

La supre metitan demandon respondas la malgrand'rusoj per la sekvanta historieto. Jam, rakontas ili, lupo persekutis la diablon en la laŭdinda intenco lin kapti kaj formanĝi. Okaze tion ĉi rimarkis malgrand'ruso, kiu laboris sur la kampo, kaj, ĉu pro tio, ke la malgrand'ruso ne povas vivi sen la diablo, aŭ ĉu pro ia alia kaŭzo — sufiĉe, li eksentis kompaton por la diablo kaj fortimigis la lupon per fortega „tju!“*) La diablo, ĝojante, ke li liberiĝis de la lupo, dankis la malgrand'ruson kaj invitis lin veni la estontan vendredon en tian kaj tian profundaĵon, kie li ankaŭ estos kaj montros sin al li aparte dankema. Li nur ne venu sole, sed alvenu kun sia plej bona amiko. La malgrand'ruso pensis, ke la plej bona amiko de viro estas lia edzino, kaj tial li iris tien kune kun sia edzino. Kiam ili alvenis al la signita loko, la diablo ankoraŭ ne estis tie kaj, por iel pasigi la tempon, la malgrand'ruso kuŝigis sian kapon sur la bruston de sia edzino, kaj, dum ŝi ĝin purigadis de certaj malpuraj bestetoj, li dolĉe ekdormis. Kiam li ĵus ekdormis, tiam la diablo, aliformiĝinte en belegan junan viron, proksimiĝis al la edzino, amindumis kun ŝi per la okuloj kaj en kelkaj minutoj tute ŝin gajnis tiel, ke ŝi volonte ekkaptis la altiritan al ŝi tranĉilon, por tratranĉi la gorĝon de sia edzo. Sed en tiu sama momento, kiam ŝi tion ĉi volis fari, la diablo, repreninte sian veran eksteraĵon, laŭte ekkriis „tju!“ tiel, ke la malgrand'ruso ekvekiĝis kaj ĝustatempe ankoraŭ povis eviti la danĝeron, kiu lin minacis.

En sekvo de tiu-ĉi okazo la diablo, farante al li fortan predikon pro lia maltrafo, admonis lin kaj donis al li la klarigon, ke ne la edzino, kiel li ja tuj vidis sur si mem, estas la plej bona amiko de l' viro, sed la hundo. La edzinon oni povas malsaĝigi, delogi; ŝi ofte forlasas la edzon, dum la hundo restas fidela al sia mastro, neniam lin forlasas, dividas kun li ĉiujn danĝerojn, ĉiun mizeron kaj, kiam mortas ĝia mastro, ĝi pli sincere malĝojas je li, ol kiu ajn el liaj parencoj.

„Tion-ĉi“, diris la diablo, „mi komunikas al vi, por turni vian atenton sur viajn efektivajn, verajn amikojn, el dankemeco por la helpo, kiun vi alportis al mi.

---

## Pri la traduko de poeziaj verkoj en la lingvon internacian.

La kreado de tutmonda lingvo kaj la disvastigado de ĝi estas tre grava afero. Angula ŝtono jam estas metita: la lingvo estas kreita kaj jam oni komencas ĝin uzi; restas uzi ĉiujn rimedojn por la plenumado de la dua parto de la temo. Sed kiel ajn bona la lingvo estus — esperi, ke oni ellernos ĝin „el amo al la arto“, estus ekstreme erare. Tia grava afero, kiel la disvolvado kaj disvastigado de la lingvo internacia devas havi kiel stimulon tre gravajn praktikajn oportunaĵojn, kiuj estus ligitaj kun la ellernado de ĝi. La facileco de interkomunikiĝo kun alilanduloj estas, kompreneble, tre grava stimulo, sed ĝi ne estas ĉion ampleksanta. Ekster la rondo de praktika agado restas ankoraŭ multo da personoj, kiuj devas eltiri utilon el la ellernado de la lingvo. Sen tiu ĉi kondiĉo la estonteco mem de la lingvo estas, parte, en danĝero. Moda demando ĝi ne estos eterne, kaj ellerni lingvon — kia ajn ĝi estas — nur por havi la rajton diri: „mi ĝin ellernis“, eĉ ne havas sencon. La ideo de la spirita proksimiĝado de diversaj nacioj dank' al lingvo internacia, unue, ne estas palpebla por la amaso kaj, due, ĝi jam supozas la fundamenton por tia proksimiĝado. Tia fundamento ne povas esti, certe, la sola ebleco de libera interŝanĝo de pensoj, oni bezonas komunecon de interesoj. Kaj ĉar ekster la sfero pure praktika amikoj de la lingvo povas fariĝi nur inteligentaj personoj, tial estas klare, ke tiaj komunaj interesoj povas esti nur la interesoj de ĉiu inteligenta persono, sen diferenco de nacio.

*) Krio, per kiu en Rusujo oni forpelas la hundojn.

Ni akceptu, ke ekzistas lingvo, donanta al la ellerninto la eblecon koniĝi kun la grandaj produktaĵoj de la homa saĝo en ia regiono, ekzemple kun la grandaj kreaĵoj de la poezio. Ni akceptu, ke la ellernado de tiu ĉi lingvo estas ekstreme facila kaj postulas tre malgrandan perdon de laboro kaj de tempo; ni aldonu ankoraŭ — kaj tio ĉi estas la plej grava punkto — ke la tradukoj de la grandaj poeziaj verkoj en tiu ĉi lingvo prezentas iajn indajn apartaĵojn, kiuj mankas al la tradukoj en aliaj lingvoj: ĉu la ellernado de tia lingvo ne estas tre oportuna afero kaj ĉu la lingvo mem ne trovus en tiu ĉi regiono de sia literaturo tiun neŭtralan fundamenton, kiun ĝi tiel bezonas por sia disvastiĝado?

Tia lingvo ekzistas: la lingvo Esperanto povas facile solvi tiun ĉi temon. Ĝi estas tre facila kaj bonsona; ĝi havas adeptojn en personoj de malegalaj nacioj, kio estas tre grava en la demando de riĉigado de ĝia literaturo. Nur tiu povas tute kompreni la spiriton de lingvo kaj rakonti bone tion, kio estas dirita en ĝi, por kiu tiu ĉi lingvo estas nature propra. Ĉiu nacio povas kaj devas riĉigi la lingvon internacian per tradukoj de grandaj verkoj de sia poezia genio. En kio do devas konsisti tiu aparteco de tiuj ĉi tradukoj, kiu devigus ŝati ilin kaj povus esti unu el la kaŭzoj de ellernado de la lingvo?

Ni parolas pri poeziaj verkoj. Poeto pensas kaj parolas per figuroj. La figuroj, kiuj estas kreitaj de li, formas la animon de lia lingvo; kiu aliigas ilin — aliigas la verkon mem. Jen estas la kaŭzo, kiel ordinare la tradukoj estas tiel similaj je la originalo, kiel figuraĵo de lernanto je pentraĵo de granda majstro. Nur ekstreme malvera estetika gusto, persekutanta eksteran brilon kun malprofito por la animo kaj forto de la genia produktaĵo — nur tiu ĉi malvera gusto devigas traduki per versoj tiajn grandajn verkojn, kiel, ekzemple, „Faust“. Jam ne dirante, ke la tradukanto *de tiaj verkoj neniam* estas egala al la aŭtoro, — estas ankoraŭ pli grava kaŭzo, kial tia traduko devas pli aŭ malpli aliigi la originalon. La kaŭzo estas en la esenco mem de rima parolo. Se la lingvoj de la tradukanto kaj de la originalo ne havas literan samecon de vortoj, kiuj interrimas kaj estas submetataj al ritmo — sed tio ĉi neniam estas — la aliigado de la originalo en rima traduko estas neevitebla. La versoj estas nur bela eksteraĵo de la verko; la figuroj, en kiuj enkorpiĝis la parolo de la poeto, estas la esenco de ĝi, — kaj, se oni devas elekti inter ili, estas klare, ke la kernon oni devas preferi al la ŝelo. La animo de verko — jen kio devas esti netuŝebla por ĉiu tradukanto: sed tiu ĉi netuŝebleco ne estas ebla, se oni aliigas tiujn figurojn, per kiuj parolas la poeto. Por tia escepta literaturo, kiel la literaturo de la lingvo internacia, tio ĉi estas ne sole demando de eksteraĵo. Eĉ la estonteco de la lingvo dependas en granda grado de ĝi. Kio povus devigi min plivoli la tradukon en lingvo arta ol tradukon en mia patra lingvo, se ili ambaŭ faras gravan eraron kaj ambaŭ pli aŭ malpli malbonformigas la originalon? Kaj konraŭe: se oni povas legi la verkojn de Ŝekspir, Bajron, Goete kaj aliaj en tia proksima kaj vera prezento, kiu nur estas ebla por traduko el alia lingvo, — multaj trovos utilon en scio de la lingvo, kian oni povas tiel facile ellerni kaj kiu povas tiel malavare rekompenci la tempon, kiu estis uzita por ellerni ĝin.

Mi persiste turnas sur tiun ĉi demandon la atenton de tiuj, kiuj volas kaj povas sin okupi je tradukoj en la lingvon internacian. Kaj ĉar la konservado de la ritmo en versa traduko ankaŭ kondukas al aliigado de la originalo, sekve tiuj ĉi mallongaj montroj devas esti uzataj ankaŭ por la senrimaj versoj. Vi volas traduki la verkojn de Ŝekspir? tio ĉi estas estiminda afero; sed ne forprenu de li la rajton de parolo! Li parolu al mi per prozo; mi estas konvinkita, ke lia prozo estos pli bona, ol la versa parolo de ĉiu tradukanto. Se mi prenas la verkojn de Ŝekspir, mi volas ja scii, kion **li** parolas kaj **kiel** li parolas, sed ne tion, kion povas paroli X aŭ Z.

N. Borovko.

Odeso. Tendaro de la rezerva bataliono. 1891, Julio.

## Profeto.

El Lermontov.

De kiam, laŭ volo de Supra Juĝanto,
Mi ĉionscianta fariĝis profeto,
Malvirton mi sentas en ĉiu vivanto,
Malicon mi vidas tra ĉiu rideto.

Mi altajn principojn de amo kaj vero
Komencis prediki al miaj kunfratoj,
Sed ili min batis kun granda kolero
Per ŝtonoj, kuŝantaj sur placoj kaj stratoj.

Kun cindro sur kapo, kun kora doloro,
Mi urbojn forlasis, sen ia havaĵo,
Kaj nun en dezerto — de Dia favoro
Nur ion mi havas por mia nutraĵo.

Laŭ sankta ordono de Antaŭtempulo
Al mi ĉiuj bestoj volonte servadas,
Kaj steloj ĉe vortoj de mi, dezertulo,
Pli ĝoje radias, pli hele lumadas.

Sed se iafoje tra urbo bruanta
Mi en rapideco pretere pasadas,
Min popolamaso renkontas mokanta
Kaj maljunularo memfide diradas:

„Rigardu, infanoj, Vin edifigante:
Li estis fiera, kun ni malpacadis;
Malsaĝa, li volis kredigi nin vante,
Ke Dio al homoj per li paroladis.

Jen frukto de lia obstina vanteco!
Jen pala, malgrasa, malgaja profeto,
En vesto ĉifona, simila al reto —
Ĉe ĉiuj li estas en malestimeco.

J. Lojko.

## Novaĵoj.

Por la celoj de nia afero, por uzi laŭ nia propra opinio, ni ricevis: de s-ro J. Puĉkovski el Kjaĥta — 60 (sesdek) rublojn; per s-ro Rjabinin el Ĥarkov: de s-rino E. N. Ŝapoŝnikova — 1 rublon, de s-rino K. K. Guminskaja — 20 kop., de N. N. — 30 kop.; de s-rino W. Szalewicz el Horodyszcz (gub. Minsk) — 50 kop.; de d-ro D. Marignoni el Crema — 1 rublon. La ricevitajn kaj ricevotajn oferojn, pri kies uzo la oferantoj nenion skribos al ni, ni de nun uzados ĉiam en la sekvanta maniero: al la personoj, kiuj oferas ne malpli ol 12 rublojn per unu fojo, ni sendos „Kartojn Fondantajn“, kiam ili estos pretigitaj (vidu „La Esperantisto“ 1891 No. 9) kun pagitaj tutajaraj kvitancoj en tiom ekzempleroj, kiom fojojn 12 rubloj ili alsendis; la oferojn pli malgrandajn, ol 12 rubloj por persono, ni uzados por nia afero laŭ nia propra bontrovo.

* * *

Post la somera libertempo, en kiu ĉiuj membroj estis disĵetitaj ekster la urbo, la 21an de Septembro (3an de Oktobro) en S. Peterburgo, en la Granda Hotelo, estis la unua komuna kunveno de la Societo „Espero". La programo de la kunveno estis: 1) tralegado de la projekto de regularo por la societo „Espero"; 2) enskribado de la personoj, dezirantaj aliĝi al la societo. La kolektitaj alsendis al ni la sekvantan telegramon en la lingvo Esperanto: „Varsovio, Nowolipki 21, L. Zamenhof. Unua komuna kunveno del societo „Espero" trinkas sanon del glora aŭtoro. Terentjef, Florell, Leffler, Wahl, Collins, de Majnov, Collins, Martinovski, Klohk, Haller, Halle, Bergemann". — La societo petas nin esprimi ĝian dankon al la amikoj por la multaj vigligaj leteroj, kiujn ĝi ricevis de diversaj flankoj.

* * *

La 8an de Septembro sinjoro Chr. Schmidt havis publikan paroladon pri nia lingvo en la urbo Schweinfurt. La parolanto klarigis la esencon de nia lingvo kaj ĝian signifon kaj montris ĝian konstruon. Prezentante al la aŭskultantoj diversajn leterojn el diversaj landoj, skribitajn en Esperanto, la parolanto montris, kiel facile estas al personoj de plej malegalaj nacioj interkomunikiĝi per la lingvo Esperanto. La alestantoj tre facile komprenis la leterojn, parte tuj sen preparo, parte per la ŝlosiloj (vortaretoj). Laŭ la peto de la alestantoj sinjoro Schmidt havis post 2 tagoj (la 10an de Septembro) duan publikan paroladon, daŭrigon de la unua. Sur la tabulo li skribis diversajn ekzemplojn de vortfarado kaj, iom post iom instruante, li finis per kelkaj frazoj skribitaj sur la tabulo, kiujn ĉiuj alestantoj tre bone komprenis. La ambaŭ paroladoj estis akceptitaj tre bone, kaj, forlasante la lastan fojon la salonon, ĉiu alestanto povis diri al si, ke li jam tute bone konas la konstruon de nia lingvo. La gastoj kore dankis la parolanton.

* * *

Kun permeso de la estraro sinjoro de Maynov elpendigis en la S. Peterburga universitato konstantan anoncon, ke li instruas senpage la lingvon Esperanto kaj liveras ĉiujn verkojn tuŝantajn tiun-ĉi lingvon.

* * *

Eliris el la presejo la broŝureto de sinjoro V. L. Kravcov (en lingvo rusa): „Vsemirnoje Djelo" (Tutmonda afero). La broŝureto tre varme propagandas nian aferon kaj admonas la legantan publikon peni, ke la registaroj enkonduku nian lingvon en la lernejoj aŭ, se tio ĉi ne estas ankoraŭ ebla, almenaŭ private per ĉiuj fortoj disvastigi la sciadon de nia lingvo. La broŝureto enhavas plenan analizon de nia lingvo, priparolon de la signifo de nia ideo kaj mallongan historion de tiu ĉi ideo. Estas nur domaĝo, ke la presejo en la malgranda urbo (Boguĉar, gub. Voronej) donis al tiu ĉi tre utila broŝureto ne sufiĉe bonan eksterajon kaj lasis multajn preserarojn. La aŭtoro intencas dissendi sian verkon al ĉiuj rusaj redakcioj kaj al diversaj privataj personoj. Kiu volas havi tiun ĉi broŝureton per ni, devas alsendi nur 2 kopekojn por la transsendo.

* * *

Lernolibrojn ne malpli ol 10 en la lasta tempo venigis s-ro E. Haller el Rostov — $^{17}/_{41}$ + $^{1}/_{28}$; s-ro N. Halle el S. Peterburgo — $^{10}/_{41}$; s-ro V. Ŝmurlo (por la libraro de f-oj Pokrovskij) el Ĉelabinsk — $^{2}/_{1}$ + $^{2}/_{2}$ + $^{25}/_{41}$ + $^{2}/_{43}$.

* * *

En la lasta tempo la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Kolosja" numero Aŭgusta (artikolo de s-ro A. Zinovjev); „Novoje Vremja" No. 5554 (pri la societo esperantista „Espero" en Peterburgo); „Russkaja Ĵizn" No. 216 (pri tio sama); „Kolvan" No. 174—388 (letero de s-ro Maynov pri tio sama); „Schweinfurter Tagblatt" No. 152 (artikolo pri nia lingvo kun gramatiko kaj diversaj ekzemploj — de d-ro K. Oppel); „Unterfränkische Zeitung" No. 216, „Schweinfurter Tagblatt" No. 213 kaj No. 217 (pri la paroladoj de s-ro Schmidt en Schweinfurt); „Kolyvan" No. 193—407 (pri la instruado de s-ro de Maynov, anoncita en la S. Peterburga universitato); „Kazanskija Vjesti" No. 84 (pri la S. Peterburgaj Esperantistoj), — No. 129 (traduko de la „Deveno de la Virino" el la „Esperantisto"), — N. 134 (pri la progresado de nia afero); „Kievskoje Slovo" No. ? (traduko de la „Deveno de la Virino"). — Al sinjoroj Zinovjev, de Maynov, Schmidt kaj Seleznjov, kiuj alsendis al ni la diritajn gazetojn aŭ sciigojn pri ili, ni esprimas nian koran dankon.

* * *

La sekvantaj sinjoroj deziras korespondadi en Esperanto:
s-ro W. H. Trompeter. Schalke, Westfalen (Germanujo);
s-ro A. Burnovski, subleŭtenanto. Brest-Litovsk (Rusujo);
s-ro G. J. Smirnov, subleŭtenanto de la 2a fortikaĵa bataliono. Brest-Litovsk (Rusujo);
s-ro N. J. Spiridonov. Petrovsk, gub. Saratov (Rusujo);
s-ro A. Martakov. Obojan, gub. Kursk (Rusujo);
s-ro M. S. Bogdanov. Sofia (Bulgarujo).

* * *

Sinjoro L. E. Meier petas nin sciigi la amikojn, ke li malaltigis la koston de sia verko (No. 45): tiu ĉi verko kostas nun anstatau 1.20 markoj (60 kop.) — nur 50 pfenigojn (25 kop.) Kiu sendas al li 5 markojn (en signoj de poŝto), ricevas 10 ekzemplerojn de la verko kun senpaga transsendo.

* * *

Sinjoro M. S. Bogdanov petas nin sciigi, ke la sekvantaj personoj pagis po 5 frankoj (membra enpago) al la esperantista societo „Espero" en Sofia:
M. S. Bogdanov. Sofia. (Bulgarujo).
S. K. Salgandĵiev, okol. naĉalnik. Plovdiv. (Bulgarujo).
B. H. Kalĉov, komercisto. Filipopol. (Bulgarujo).
B. Slavĉov, uĉenik 5 kl. Ruŝĉuk. (Bulgarujo).
N. M. Besarabov, bolniĉen naziratel. Ruŝĉuk. (Bulgarujo).
Boris Marinov, v okr. uprav. Ruŝĉuk. (Bulgarujo).
Haralampi Nedjelkov, uĉenik 5 kl. Razgrad. (Bulgarujo).
S. Skonomov, libristo (kniĵar). Razgrad. (Bulgarujo).
Dimitro Ivanov, libristo. Silistra. (Bulgarujo.)
M. Ajdemirski, kontroloro. Vrasta (Bulgarujo).
S. Mihailov, advokato. Silistra. (Bulgarujo).
Gradsko obŝtinsko upravlenie. Silistra. (Bulgarujo).
Stevan Kamburov, sudeb. pristav. Sviŝtov. (Bulgarujo).
Atanas Veter, mirovi sudja. Sviŝtov. (Bulgarujo).
Niĥola Paruŝev, sudeb. pristav. Nikopol. (Bulgarujo).
G. A. Petrov, mirovi sudja. Vidin. (Bulgarujo).
Todor Kacarov, presisto (peĉatar). Tatar-Pazardĵik. (Bulgarujo)
Ganĉo Iv. Popov. S. Doskot, Paskalevska okolica, Ternovsko, (Bulgarujo).
Sanaki Vaĵarov, en Visŝe Uĉiliste. Sofia. (Bulgarujo).
Atanas Antikarov, en Smetna Palata. Sofia. (Bulgarujo).
G. P. Oreŝkov, oficisto de la telegrafo. Sofia. (Bulgarujo).

* * *

Uzitajn signojn de poŝto ni ricevis de la sekvantaj personoj: d-ro K. Bentkovski kaj s-rino Olga Arĥangielskaja el Aŭlie-Ata, s-ro S. O. Ŝatunovski el Volĉinec, s-rino Emma Gelrot el Balta. Ni dankas por la amika memoro, sed ni petas, ke estonte la amikoj sendu la uzitajn signojn de poŝto ne al ni, sed al la Internacia Klubo de Korespondado en Nurnbergo (per adreso: al sinjoro Friedrich Ebersberger, Nürnberg, Hübnersplatz 1).

## Aldono al la matematika regulo en No. 5.

Se niaj legantoj turnis atenton sur la regulon donitan en No. 5 de „La Esperantisto" por multobligi nombrojn partumajn, kunmetitajn el tutaj kaj duonoj, ili vidis, ke, kiam la partumoj estas duonoj, post la aldono de la partumo de la pli malgranda nombro al la partumo de la pli granda ni aldonas duonon de la diferenco inter la du unuaj tutaj nombroj, ĉar la multobliganto estas duono; poste ni aldonas kvaronon, ĉar $\frac{1}{2} \times \frac{1}{2} = \frac{1}{4}$. El tio ĉi ni povas eltiri regulon komunan:

multobligante inter si nombrojn, kunmetitajn el tutaj kaj partumoj, aldonu la partumon de la pli malgranda nombro al la nombro pli granda kaj multobligu ilin; poste aldonu tian parton de ilia senpartuma diferenco, kia estas la partumo de la multobliganto kaj fine ankoraŭ aldonu la produkton multobligan de la ambaŭ partumoj.

Ekzemploj:

$4\frac{1}{4} \times 2\frac{1}{4} = 4\frac{1}{2} \times 2 + \frac{1}{2}$ (t. e. $\frac{1}{4}$ de la diferenco) $+ \frac{1}{16} = 9\frac{9}{16}$

$4\frac{3}{4} \times 2\frac{3}{4} = 5\frac{1}{2} \times 2 + 1\frac{1}{2}$ (t. e. $\frac{3}{4}$ de la diferenco) $+ \frac{9}{16} = 13\frac{1}{16}$

$6\frac{2}{3} \times 3\frac{2}{3} = 7\frac{1}{3} \times 3 + 2$ (t. e. $\frac{2}{3}$ de la diferenco) $+ \frac{4}{9} = 24\frac{4}{9}$

$8\frac{1}{4} \times 4\frac{3}{4} = 9 \times 4 + 3$ (t. e. $\frac{3}{4}$ de la diferenco) $+ \frac{3}{16} = 39\frac{3}{16}$

Laŭ tiu ĉi maniero oni povus ankaŭ multobligi neegalajn partumojn, nur tiam prezentiĝos malfacileco ĉe parkera aldonado de la partumoj neegalaj.

J. Grohn.

---

## La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.

(Daŭrigo.)

Tiu ĉi reciproka ĝentileco estis ĉe la ambaŭ familioj malnova moro; ĉar ili ĉiuj estis tre amikaj inter si kaj vivis en agrabla senceremonieco. Eble la malsincera Craggs kaj la malbona Snitchey estis ĉe la virinoj nur jurista fikcio, kiel *Cajus kaj Sempronius* en la aktoj de la ambaŭ edzoj: sed la ambaŭ virinoj mem faris kaj prenis tiujn ĉi akciojn en la negoco, por nur ne esti tute esceptitaj. Tio ĉi en ĉia okazo estas senduba, ke ĉiu el la ambaŭ virinoj sian okupon kondukadis tiel same fervore kaj diligente, kiel ŝia edzo la sian, kaj ke ĉiu pensis, ke feliĉa prosperado de la firmo sen ŝiaj laŭdindaj penoj estus preskaŭ neebla.

Sed nun la birdo paradiza flugis tra la mezo, kaj la soniletoj komencis saltadi kaj sonadi; kaj la ruĝa vizaĝo de la doktoro sin turnadis kaj returnadis, kiel brile lakita turnaĵo kun homa vizaĝo; kaj la senspira sinjoro Craggs komencis jam dubi, ke la dancado, kiel la cetera vivo, estas farata al la homoj tro facila; kaj sinjoro Snitchey dancis kun viglaj saltoj por si, Craggs kaj por seso da aliaj personoj.

Kaj ankaŭ la fajro ricevis freŝan humoron kaj pli hele brulis, disblovita de la vento, kiun faris la dancado. Ĝi estis la genio de la ĉambro kaj trovis sin ĉie. Ĝi brilis en la okuloj de la viroj, en la juveloj sur la blankaj brustoj de la knabinoj, ludis ĉirkaŭ iliaj oreloj, kvazaŭ petole murmuretante ion al ili, lumigis la plankon kaj metis rozan tapiŝon al iliaj piedoj, brilis sur la plafono, ke ĝia flamo rebrilis sur iliaj vizaĝoj, kaj ekbruligis grandan iluminacion en la malgranda turo de soniletoj de sinjorino Craggs.

Kaj nun la aero fariĝis pli freŝa, kaj la muziko fariĝis pli energia kaj la dancoj iris en pli viva takto; kaj leviĝis blovado, kiu balancis la foliojn kaj la berojn sur la muroj, kiel antaŭe sub la libera ĉielo; kaj bruo iris tra la ĉambro, kvazaŭ nevidebla amaso da elfoj akompanus la dancantojn. Nun nenia trajto de la vizaĝo de la doktoro jam povis esti rekonata, kiam li sin turnadis ĉirkaŭen; nur ŝajnis, ke tuta deko da paradizaj birdoj flugas tra la ĉambro kaj ke milo da malgrandaj soniletoj sonas; tuta armeo da flugantaj vestoj sin portis en la ventego, kiam la muziko silentiĝis kaj la dancado ĉesis.

La varmego kaj laciĝo faris la doktoron nur pli senpacienca je la veno de Alfred.

„Ĉu vi ion vidis, Britain? ion aŭdis?"

„Estas tro mallume, por povi malproksime vidi, kaj tro multe da bruo en la domo, por povi ion aŭdi," respondis la servanto.

„Tio ĉi estas vera! Tiom pli gaja estos la akcepto. Kioma horo nun estas?"

„Ĝuste la dekdua, sinjoro. Li devas jam baldaŭ veni, sinjoro."

„Tiel disheligu la fajron kaj ĵetu sur ĝin ankoraŭ unu pecon da ligno", diris la doktoro. „Lia akcepta saluto devas lumi al li renkonte tra la nokto, kiam li pli kaj pli proksimiĝados!"

Li vidis ĝin — jes! El sia kaleŝo li ekvidis la lumon, kiam li turnis angulen apud la malnova preĝejo. Li konis la ĉambron, el kiu la lumo venis. Li vidis la nudajn branĉojn de la longe konataj arboj inter la lumo kaj si. Li sciis, ke unu el tiuj ĉi arboj en la somero agrable bruas antaŭ la fenestro de Marion.

Larmoj staris al li en la okuloj. Lia koro batis tiel forte, ke li apenaŭ povis elporti sian feliĉon. Kiel ofte li rememoradis tiun ĉi tempon, pentradis ĝin al si sub ĉiaj cirkonstancoj, timadis, ke ĝi ne venos, kaj ĝin deziradis kaj sopiradis je ĝi en malproksima, malproksima loko!

Denove la lumo! Klare kaj malproksime lumante, ekbruligite, kiel li sciis, por lin saluti kaj lumi al li al la malnova domo. Li faradis signojn per la mano, levadis la ĉapelon kaj kriadis al ili, kvazaŭ ili estus la lumo kaj povus lin aŭdi kaj vidi, kiel li ĝojege rapidas al ili sur la vojo.

Haltu! Li konis la doktoron kaj antaŭsentis, kion li faris. Li ne devis fari al ili surprizon. Tamen li ĝin povus fari, se li per piedoj irus al la domo. Se la pordo de la ĝardeno estis ne fermita, li povus tra tie eniri; se ne — transrampi la muron estis tre facile, kiel li sciis de la tempo malnova, kaj en unu minuto li estus inter ili.

Li eliris el la kaleŝo kaj diris al la veturigisto — eĉ tio ĉi ne estis al li facile en lia ekscititeco — ke tiu ĉi haltu kelkajn minutojn kaj poste malrapide veturu post li. Tiam li rapide ekiris antaŭen, provis, ĉu la pordo estas nefermita, transrampis la muron, desaltis sur la dua flanko kaj malfacile spirante staris en la malnova frukta ĝardeno.

Sur la arboj kuŝis blanka prujno, kiu en la malforta lumo de la ennuba luno pendis sur la maldikaj branĉoj, kiel velkintaj girlandoj. Sekaj folioj krakis sub liaj piedoj, kiam li mallaŭte alŝteliĝis al la domo. La dezerteco de vintra nokto estis rimarkebla sur la tero kaj sur la ĉielo. Sed la ruĝa lumo briladis al li afable renkonte el la fenestroj, figuroj de homoj sin movadis antaŭ liaj okuloj, kaj la murmuro de homaj voĉoj agrable tuŝadis liajn orelojn.

Penante ekaŭdi ŝian voĉon el la aliaj ceteraj voĉoj kaj jam duone konvinkite, ke li ŝin aŭdas, li jam preskaŭ atingis la pordon, kiam ĝi subite rapide estis malfermita kaj unu homa figuro venis kontraŭ li. La figuro ektimigite kaj kun duone interrompita ekkrio retiris sin.

„Clemency," li diris, „ĉu vi min jam pli ne konas?"

„Ne eniru," ŝi respondis, barante al li la eniron. „Foriru. Ne demandu kial. Ne eniru!"

„Kio estas?" li ekkriis.

„Mi ne scias. Mi — mi timas pensi pri tio ĉi. Foriru. Ĉu Vi aŭdas?"

Subita bruo leviĝis en la domo. Ŝi kovris al si per la manoj la orelojn. Krio de malespero, tiel laŭta, ke nenia mano povis bari la orelon, estis aŭdita; kaj Grace — kun teruro en la vizaĝo kaj en la gestoj — elkuris el la domo.

„Grace!" Li retenis ŝin per la brako. „Kio estas? Ĉu ŝi mortis?"

Malgranda kaleŝo, veturigata de unu knabo, venis kun bruo de la vojo; kaj interne, havante post si grandan bone malsekigitan ombrelon, disetenditan por sekiĝi, sidis la korpulenta figuro de virino de matura aĝo, kruciginte la nudajn brakojn super korbo, kiun ŝi portis sur la genuoj, kaj havante diversajn aliajn korbojn kaj pakaĵojn ĉirkaŭ si. La afabla bonkora vizaĝo kaj certa memkontenta senhelpo, kun kiu ŝi de la puŝoj de la kaleŝo balanciĝadis tien kaj reen sur sia sido, jam de malproksime rememorigadis malnovajn tempojn. Kiam ŝi venis pli proksime, tio ĉi ankoraŭ pli estis rimarkebla; kaj kiam la veturilo haltis apud la drinkejo kaj paro da ŝuoj, elirante el la kaleŝo, rapide flugis tra la malfermitaj brakoj de sinjoro Britain kaj kun peza ekpremo tuŝis la teron, oni povis tuj rekoni, ke tiuj ĉi ŝuoj povis aparteni al neniu alia ol Clemency Newcome.

Kaj tiel efektive estis. Jen ŝi staras antaŭ ni, sana korpulenta animo, kun tiom da sapo sur la brilanta vizaĝo, kiel antaŭe, sed kun nedifektitaj kubutoj, kiuj nun preskaŭ montris kavetojn.

„Vi longe forrestas, Clemency!“ diris sinjoro Britain.

„Jes, vidu, Ben, mi havis multe por fari!“ ŝi respondis, vive observante la enportadon de ŝiaj korboj kaj pakaĵoj; „ok, naŭ, dek, — kie estas dekunu? Ho! mia korbo dekunu! Estas ĝuste. Konduku la ĉevalon en la ĉevalejon, Harry, kaj se ĝi denove tusos, donu al ĝi hodiaŭ vespere varman miksitan manĝon. Ok, naŭ, dek, — nu kie estas dekunu? Ho, mi forgesis, estas bone. Kiel fartas la infanoj, Ben?“

„Sanaj kaj viglaj, Clemency.“

„Dio gardu iliajn ĉarmajn vizaĝojn!“ diris sinjorino Britain, demetante la ĉapelon (ĉar ŝi kaj ŝia edzino estis nun en la drinkejo) kaj glatigante al si la harojn per la manplato. „Donu al mi kison, maljuna!“ Sinjoro Britain ne lasis ŝin atendi.

„Mi pensas,“ diris sinjorino Britain kaj eltiris tutan pakaĵon da maldikaj libroj kaj ĉifitaj paperoj el la poŝo, „mi ĉion plenumis. La kalkuloj ĉiuj pagitaj — la rapo vendita — kalkulo kun la bierfabrikanto farita — pipoj menditaj — deksep funtoj kvar ŝilingoj en la bankon pagitaj — kaj la recepto de doktoro Heathfield por la infano — vi jam divenos, kiel estas. — Doktoro Heathfield denove nenion volas preni, Tim.“

„Mi tuj tiel pensis,“ rimarkis Britain.

„Jes. Li diris, Tim, kiel ajn granda via familio eĉ estos, li neniam prenos de vi eĉ duonon da penco; eĉ se vi ricevos dudek infanojn.“

La vizaĝo de sinjoro Britain ricevis esprimon tre seriozan kaj senmove rigardis sur la muron.

„Ĉu tio ĉi ne estas tre afable?“ diris Clemency.

„Certe,“ respondis sinjoro Britain. „Sed tio ĉi estas afableco, el kiu mi por nenio en la mondo volus fari uzon.“

„Ne,“ diris Clemency. „Kompreneble ne. Poste la ĉevaleto — ĝi alportis ok funtojn kaj du ŝilingojn; kaj tio ĉi estas ne malbone, ne vere?“

„Tio ĉi estas tre bone,“ diris Ben.

„Mi ĝojas, ke vi estas kontenta,“ ekkriis lia edzino. „Mi tuj tiel pensis; kaj tio ĉi, mi pensas, estas ĉio, kaj nun nenion pli pri negocoj, Britain. Ha, ha, ha! Jen! Prenu la paperoja kaj trarigardu ilin. Ho, atendu momenton; jen estas ankoraŭ presita folieto. Ĵus el la presejo. Kiel bone ĝi odoras!“

„Kio tio ĉi estas? diris Tim kaj rigardis la folion.

„Mi ne scias,“ respondis lia edzino. „Mi ne legis eĉ unu vorton.“

„Vendo per memvola aŭkcio,“ legis la mastro, „kun rezervo de antaŭa privata konsentiĝo.“

„Tion ĉi ili ĉiam aldonas,“ diris Clemency.

„Jes, sed ne ĉiam tion ĉi,“ li respondis. „Rigardu: sinjora domo kaj konstruoj mastraĵaj, parko kaj ĝardeno de sinjoroj Snitchey kaj Craggs kaj la senŝulda bieno de la nobelo Mich. Warden, pro forveturo en la eksterlandon!“

„Pro forveturo en la eksterlandon!“ ripetis Clemency.

„Jen tio ĉi staras,“ diris sinjoro Britain. „Rigardu tien ĉi.“

„Kaj ĵus hodiaŭ mi tie aŭdis, ke ŝi baldaŭ alsendos pli bonajn kaj pli klarajn novaĵojn!“ diris Clemency, malgaje balancante la kapon kaj denove kaptante siajn kubutojn, kvazaŭ la rememoro de malnovaj tempoj ankaŭ revekus malnovajn kutimojn. „Hm, hm, hm! Tio ĉi tie denove pezigos la korojn, Ben.“

Sinjoro Britain ĝemis kaj balancis la kapon kaj diris, ke li ne povas tute kompreni la aferon kaj longe ĉesis pensi pri ĝi. Kun tiu ĉi rimarko li kontentigis sin kaj algluis la folion post la fenestro de la botelaro, kaj Clemency, starinte kelkajn minutojn en pensoj, vekiĝis kaj rapidis for, por rigardi la infanojn.

Kvankam la mastro de la kribilo de muskato havis grandan estimon por sia edzino, tamen tiu ĉi estimo havis tute la malnovan patronan karakteron; kaj ŝi forte lin amuzadis. Nenio pli mirigus lin, ol se iu tria montrus al li, kiel ŝi sola kondukas la tutan mastraĵon kaj per prudenta ŝparemeco, bonvigla humoro, honesteco kaj diligenteco faras lin homo bonhava. Tiel facile estas en ĉiaj cirkonstancoj (kaj tro ofte ĝi okazas) taksi la trankvilajn naturojn, kiuj neniam metas en lumon siajn meritojn, laŭ ilia propra modesta juĝo, kaj ofende sin amuzi pro eksteraj strangaĵoj kaj apartaĵoj je homoj, kies interna indo, se ni pli profunde volus rigardi, devus nin igi ruĝiĝi antaŭ ili!

Sinjoro Britain kun plezuro pensadis pri la grandanimeco, kun kiu li edziĝis je Clemency. Ŝi estis por li eterna atesto de lia bona koro, kaj li sentis, ke ŝia bonegeco estas nur jesigo de la malnova sentenco, ke la virto sin mem rekompencas.

Li algluis la folion, kaj la kvitancojn pri la negocoj de la hodiaŭa tago li enŝlosis en la ŝrankon de la drinkejo — ĉiam ridante por si pri ŝia lerteco en negocoj — kiam ŝi revenis kun la sciigo, ke la ambaŭ sinjoretoj Britain sub la observado de Betsy ludas en la kaleŝejo kaj la malgranda Clemency dormas „kiel anĝelo.“ Nun li ankaŭ sidiĝis al la teo, kiu en atendo de ŝia veno staris sur malgranda tablo. Ĝi estis bela malgranda bufedo kun la ordinara ornamo de boteloj kaj glasoj kaj kun solida horloĝo, kiu iris bone laŭ la minuto, (estis duono de la sesa horo); ĉiu objekto staris sur sia deca loko kaj estis plej perfekte brile purigita kaj polurigita.

„La unuan fojon mi hodiaŭ povas trankvile sidi,“ diris sinjorino Britain kaj profunde ekspiris, kvazaŭ ŝi nun sidos jam la tutan vesperon; sed ŝi tamen baldaŭ ree sin levis, por enverŝi teon al sia edzo kaj tranĉi panon kun butero. „Kiel tiu ĉi folio rememorigas min pri tempoj malnovaj!“

„Jes, jes!“ diris sinjoro Britain, prenante sian pladeton kiel ostron kaj sorbante ĝin en tia sama maniero.

„Tiu ĉi sama sinjoro Michael Warden,“ diris Clemency meditante, „faris min perdi mian malnovan oficon.“

„Kaj alportis al vi edzon,“ diris sinjoro Britain.

„Nu jes,“ respondis Clemency, „kaj por tio ĉi mi volas lin ankaŭ danki.“

„La homo estas sklavo de la kutimo,“ diris sinjoro Britain kaj rigardis ŝin trans tiu pladeto. „Mi kutimis je vi kaj vidis, ke mi sen vi ne bone min sentos. Ha, ha! Kiu tion ĉi pensus!“

(Daŭrigo venos.)

